

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75  
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 òre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =  
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

---

III:a jaro.

Majo 1898.

N:o 5 (29).

---

## El Moskvo.

Traleĝinte nian unuan komunikiĝon pri la fondiĝo en Moskvo de l' "Moskva Esperantista Rondeto", legantoj de nia gazeto nun kredeble pensas: kial dum tiom longa tempo nenio estas aŭdata el Moskvo. Ĉu niaj moskvaj amikoj perdis sian kuraĝon, aŭ al ili ne prosperis ilia esperantista agado, aŭ, eble, ili returnis antaŭ la opinio de l' plimulto. Ne, niaj karaj kunbatalantoj, tute ne! Ni ne perdis kuraĝon kaj kredon je nia sankta kaj nobla afero, nek "nin timigos la mokoĵ de l' homoj". Ĉefa kaŭzo de nia silentado estas nur simpla manko de l' tempo, ĉar plimulto de niaj membroj estas homoj okupitaj aŭ en la diversaj oficejoj aŭ je siaj propraj aferoj. Mi do havas tiom da afero, ke apenaŭ povas plenumi miajn rektajn devojn. Sed en Moskvo ni laboras senĉese kaj senlace, kaj nia Rondeto pligrandiĝas de tago al tago.

Ni havas nun jam 16 da membroj. Ni havis 3 komunajn kunvenojn por preparoli niajn aferojn kaj rimedojn de l' esperantista propagando en Moskvo. Pri la unua mi jam skribis en L. I. En la dua komuna kunveno ni akceptis tre gravan por nia sekvanta agado decidon *peti ĉe S. Feterburga Societo Espero pri la fondiĝo en Moskvo ĝian filion*. Due ni decidis niajn membrojn, kiuj ne estas enskribitaj en adresaro, enmeti tien tuj. Nia Rondeto posedas malgrandan bibliotekon, kiu konsistas el 38 libroj pri kaj en lingvo Esperanto. Por pligrandigi ĝian aron ni decidis enmeti en la kason de nia Rondeto ĉiumonate po 20 kop. de ĉiu membro. Fine en tiu-ĉi kunveno laŭ mia propono estis elektitaj kiel efektivaj membroj (honorajn ni ne havas) sinjoroj L. Zamenhof, V. Gernet kaj V. Langlet. Je nia 3-a kunveno, kiu havis lokon 21 de marto, ni preparoladis detalojn de l' peto al Espero kaj la proklamacion al esperantistoj de s-ro Ostanjeviĉ, kaj decidis, ke ĉiu nia membro skribu al li respondon aparte. La kunveno akceptis mian proponon oferadi por la Kapitalo de d-ro Zamenhof po 5 kop. ĉiumonate de ĉiu membro. La peto pri fondiĝo de l' filio en Moskvo estos sendita al Espero post plej mallonga tempo.

Nia esperanta agado en Moskvo ne restis senfrukta. Unu el la plej bonaj komercaj lernejoj de Moskvo, nome "Ecole des correspondants étrangers

(Lernejo de eksterlandaj korespondantoj)“, kies sekretario, s-ro Evgeni Mansfeld, fariĝis danke al niaj penoj varmega adepto de Esperanto, konsentis de Aŭgusto 1898 jaro enkonduki la lingvon Esperanto, kiel devan por siaj lernantoj. En la kursoj de eksterlandaj lingvoj, kiuj estas legataj en tiu-ĉi lernejo, de Aŭgusto estos ankaŭ akceptita lingvo Esperanto. Mi devas aldoni tie-ĉi, ke en tiu lernejo estas legataj kursoj de la sekvantaj lingvoj: angla, franca, germana, rusa (por eksterlandanoj), itala, hispana, persa kaj de nun Esperanta. S-ro Mansfeld estas iom verkisto kaj intencas propagandadi Esperanton en preso. La Odesa filio de l' societo Espero alsendis al ni kompoziciojn de s-ro Tanejev por eldoni ilin en Moskvo. Mi kredas, ke ili estos eldonitaj tie ĉi, des pli, ke tiam ili estos korektataj de l' aŭtoro mem.

El ĉio dirita, karaj legantoj, vi povas vidi, ke ni tute ne dormis, sed laboris, laboris obstine kaj ne sensukcese, ĉar nia laboro ĝis nun donis kelkajn fruktojn. Ne pensu kaj ne timu, ke ni iam perdos kuraĝon, sed bone sciu, ke “cum tacent, laborant“, kaj kiam oni parolas — sekve finis laboron. Mi nun tute ne timas kaj ne dubas je sukceso de nia afero en Moskvo, mi tre konfidas, ke kiam nur estas farita ie fundamento por esperanta agado, ĝi neniam estos detruita, ĉar ni kredas je la vero, kaj la ideo de Esperanto estas senduba kaj pura vero. Esperanto jam ekzistas 10 jaroj kaj dum ĝia ekzistado eltenis multe da tiaj batoj, kiuj ĉiun alian lingvon, mi pensas, mortigus nepre: la lasta kaj la plej terura bato estis donita al ĝi en 1895 jaro, sed nia lingvo eltenis eĉ tiun mortan, kiel pensis la malamikoj de nia ideo, baton, eltenis kaj komencis vastiĝi ankoraŭ pli rapide. Ne ni, sed niaj malamikoj devas perdi, kaj eĉ perdis la kapon. Jen kia estas lingvo, jen kia estas utopio! ke mortigemaj batoj por ĝi ne estas mortigantaj. Frenezuloj, ĉu ili ne scias, ke la ideoj de l' homaro estas nemorteblaj, ĉu ili ne vidas kontraŭ kio ili batalas. Nun ni estas venkantoj, nun parto de “miljaraj muroj inter la popoloj“ estas jam detruita kaj en hela lazuro de l' estonteco ni vidas la plenumon de la bela sonĝo de l' homaro. Laboru do, karaj amikoj kaj kunideanoj, laboru kaj rakontu al indiferenta mondo pri viaj venkoj, por ke ĝi kliniĝu antaŭ la faktoj. Ni ĉiuj laboros kune, kaj rigardante unu la alian ni vigliĝos per la akceptitaj venkoj kaj pli konfide iros sub la glora signo de l' Espero.

Moskvo 20<sup>a</sup> IV. 1898.

V. Fedorovski.

—>❖<—  
Novajoj.

Por la filinoj de l' esperantistaro.

Laŭ la alvoko al ĉiuj esperantistoj, kiun faris s-ro V. Langlet en la marta n-ro pĝ 34, donacis por tiu ĉi celo s-ro *Karl Wijkström*: 1 kr.

\* \* \*

**Le Petit Bleu.** Laŭ la propono de la Direktoro de la gazeto “Petit Bleu“, s-ro E. Blanjean dissendis al ĉiuj abonantoj de “Lingvo Internacia“ la numeron 144 (24 de Apr. 1898) de tiu ĉi dirita gazeto, enhavantan kroniketon Esperantan.

\* \* \*

La dua eldono de la lernolibro sveda (de P. Nylén) estas nun presita kaj ricevebla ĉe la Klubo Esperantista en Uppsala.

\* \* \*

El Rusujo ni ricevis la malĝojan sciigon, ke <sup>10</sup>/<sub>22</sub> III en Arco (Tirolo) mortis la konata al ĉiuj malnovaj niaj kunbatalantoj pola esperantisto *Jan Janowski*, bona amiko de l' mortinta Jozef Wasniewski, kiun li nun sekvis tra la pordo nur internen malfermiganta.

\* \* \*

### Publikaj paroladoj kaj nova klubo.

El Belgujo s-ro Fr. Roelandt skribas al ni interalie la sekvantan: Alestinte al la parolado de s-ro leŭtenanto Lemaire kaj al la kurso de s-ro Blanjean en la Klubo Poliglota Brusela, mi parolis pri Esperanto en *Gilly apud Charleroi* la 20-an de Marto: jam la saman tagon, kelkaj amikoj, admirante la lingvon internacian pro ĝiaj multaj ecoj, kunvenis kun mi por fondi Klubon Esperantistan Jillian kaj aranĝi kurson. Oni elektis min: prezidanto; s-ron Aug. Cormont: subprezidanto, kaj s-ron Edm. Piron: sekretario-kasisto.

La 24-an de Aprilo mi parolis pri Esperanto en *Louvain* antaŭ aŭdantaro da pli ol cent personoj kaj mi forte kredas, ke la semo kreskos. Tie nia kara lingvo akiris certe novajn amikojn, ĉar multaj esprimis al mi sian miron kaj almenaŭ dek el ili diris, je propra movo, ke ili lernos la lingvon. Mi kuraĝigis ilin fondi Klubon kaj aranĝi kurson; ili promesis tion fari laŭ sia povo.

\* \* \*

**Pri Esperanto parolis:** En Belgujo la gazeto *Pays Wallon* (eldonata en Charleroi) la 27-an de marto presis pri la parolado de s-ro Roelandt en Gilly mallongan artikolon tre favoran je nia lingvo, sciigis la fondigon de la Klubo Esperantista Jillia kaj anoncis la publikan kurson, kiu komencis en Gilly la saman tagon kaj kunigis dudek fervorajn lernantojn.

En la gazeto *Stockholms-Tidningen* N:o 2537, la 12 Apr., aperis noto de la enhavo sekvanta: "Gimnaziano titolata profesoro ekzistas ĉe la Karolina lernejo en Örebro; tiun ĉi — altan rilate persono de lia situacio — titoladon li akiris pro sia lerteco je la lingvo Esperanto. En tiu ĉi moderna lingvo la junulo korespondadas kun sciantaj Esperanton sur ambaŭ la duonoj de la terglobo, kaj li estas vokita membro-korespondanto de instruitaj en tiu rilato societoj kaj en Hispanujo kaj en Italujo". Tiun ĉi artikoleon reprenis multe da svedaj gazetoj kaj ankaŭ finlandaj (ekz. *Nya Pressen* N:o 102 B la 17 Apr.) kaj esperantistoj skribis al ni demandante, ĉu estas vero. Tial ni skribigis en *Stockholms-Tidningen* (N:o 2549 B) kaj en *Upsala Nya Tidning* (N:o 1128), ke nenia esperantista societo en Svedujo nek en eksterlandaro disdonas iajn ajn honorajn titolojn, kaj cetere en la nomitaj landoj tielaj societoj tute ne ekzistas.

La aprila numero de *O Philatelista do Occidente*, eldonata en Porto, Portugalujo, enhavas, krome alian tekston, du artikolojn en esperanto kun apuda portugala traduko, nome unu: pri la festoj en Lisabono dum Majo pro la 400-jaro de l' eltrovo de Hindujo per Vasco da Gama; la dua: pri la novaj poŝtaj signoj portugalaj memorigantaj tiun okazon.

En Rusujo la granda "*Pietierburgskaja Gazeta*", la plej disvastigita en Peterburgo kaj ĉirkaŭaĵoj komencis presadi ĉiusemajnajn kroniketojn pri nia lingvo kaj afero sub la redaktado de s-ro K. Ostanieviĉ. N:o 105 de la dirita gazeto enhavas la komencan artikolon, kiu donas la necesajn informojn pri Esperanto, pri ĝia aŭtoro kaj konstruo, la komencajn regulojn de la gramatiko kaj, kiel modelon de lingvo, kelke da versoj el poemo Esperanta.

## Skizoj de Baku.

### Brulanta nafta fontano apud Baku.

La legantoj certe scias, ke nafto estas fluida mineralo-miksaĵo de diversaj karbohidrogenoj. La akirlokoj de nafto sur la Apŝerona duoninsulo de la maro Kaspia en ĉirkaŭaĵoj de Baku estis konataj jam en antikvaj tempoj, — sed ĝis la mezo de nuna centjaro la nafto estis akirata el nemultaj neprofundaj putoj; poste la spertoj pri akiro de lum-oleo (fotogeno, petrolo, keroseno) de nafto kaj la sekvigita per ili postulo de tiu ĉi mineralo devigis komenci la akiron de nafto ile borputoj, iafoje, de granda profundeco. La nafto estas elmontrita en la ĉiuj antaŭmontaĵoj de la Kaŭkaza montĉeno; ĝi estas akirata ankaŭ en aliaj lokoj de Eŭropo (Aŭstrujo, Rumanujo) kaj de aliaj mond-partoj (Java, Perujo, Japanujo, aparte en Pensilvanujo, Ameriko), sed tamen ĝis nun la Apŝerona duoninsulo pro ĝia superflueco de nafto estas la unua loko de Malnova Mondo, kaj eble de tuta mondo.

El borputoj la nafto estas ĉerpadata (kiel akvo el putoj), sed kompreneble ile perfektigitaj manieroj kaj maŝinoj, kaj estas poste fluigata per tuboj en "naftajn lagojn" (kavegojn), el kiuj ĝi estas denove fluigata per tuboj aŭ transportata per verŝŝipoj en fabrikojn, kiuj ile partuma distilado fabrikas de ĝi gazolinon, benzinon, astralinon, kerosinon; la restaĵojn ("mazut") oni uzas por hejto de vaporkaldronoj, lokomotivoj, vaporŝipoj, por fabrikado de solaraj kaj maŝinaj oleoj, vazelino k. c., k. c. Ĉiuj tiaj fabrikoj en Baku estas lokataj en orienta urbparto, nomata "Nigra Urbo", kaj en ĝia daŭrigo — "Blanka Urbo" (kiu estas nomata tiel nur pro tio, ke ĝi ne estas "Nigra", kvankam la fumo kaj fumaĵo estas tielaj samaj en ambaŭ lokoj); la naftaj do akirlokoj estas kuŝantaj nordorienten en ĉirkaŭaĵoj de Baku (Balahani, Romani, Sabunĉi); sudokcidenten preskaŭ apud la urbo mem sur la bordo de l' maro en kratero, ĉirkaŭata per montoj, estas kuŝanta malgranda naftakira plato, nomata Bibi-Ejbat.

La nafto troviĝas en la tero en apartaj kavernoj, kuŝantaj en sulkoj de defalantaj montaj specoj; en la supraj partoj de tiuj-ĉi kavernoj troviĝas gasoj, kiuj iom post iom eliras en tempo de l' borado: sed iafoje — en sekvo de premo de l' gasoj, kolektiĝintaj sub la tero, — la nafto el la malfermo de l' bor-tubo (eĉ kiam la nafto jam estas akiradata) komencas eljetiĝi fontane de multaj metroj altece. En sabato, la 17<sup>a</sup> Aprilo 1897 — en la nafta akirloko de Kaspia-Nigramara societo (Rothschild) en Bibi-Ejbat ekkomencis eljetiĝi fontano: sep aŭ ok semajnoj antaŭ tio ĉi el tiu sama "viŝka" (kvarangula turo, kiu oni metas borante puton; en ĝi estas lokataj la maŝinoj) la nafto eljetiĝis fontane, sed ĝi ĉesis post tri aŭ kvar tagoj, ĉar en la bor-tubo fariĝis "korko", t. e. amasiĝo de ŝtonoj, tero kaj sablo (kiuj estas eljetataj kune kun la nafto) de tiela forteco, ke ĝi povas deteni la premon de nafto: post la fariĝo de l' korko oni ĉiam atendas dum kelkaj semajnoj kaj poste disrompas la korkon, tiam aŭ la fontano rekomencas eljetiĝi, aŭ — se tio ĉi ne okazis — oni komencas akiri nafton ile ordinara maniero. Post la fariĝo de l' korko en tiu ĉi fontano oni ekdisrompadis la korkon, kaj apenaŭ oni finis tiun ĉi laboron, la fontano ekkomenciĝis kun terura forteco, eljetante grandajn kvantojn da nafto. Kelkaj horoj post la komenco — la fontano ekbrulis en sekvo de kaŭzo necerta: eble de fajrero, deveninta per ekbato de l' eljetinta ŝtono super la fera tubo; eble — de malsingardeco. La tuta hori-

zonto estis kovrata per larĝa strio de nigra fumo, kaj nokte la ruĝo de l' brulego lumigadis la tutan urbon, post la promontoro Bailov, kiu kaŝas de la urbo Bibi-Ejbat'on, — unu duono de ĉielo ŝajnis esti fajraĵo; kaj sur la korto de mia loĝejo (5—6 kilometroj de l' fontano) estis tute luma. En dimanĉo la fontano daŭrigis bruli, sed la vento ŝanĝiĝis, kaj pelis la fumon rekte la urbon. Ĉe krepusko mi veturis per ĉevalfervojo Bailovon, kaj de tie mi piediris ĉirkaŭe tri kilometrojn ĝis la brulego. La vojo komence leviĝas monton, sed baldaŭ ĝi malleviĝas Bibi-Ejbat'an krateron, al la maro. La vento estis forta; polvo kaj sablo de vojo gluadis la okulojn, laŭlonge la vojo, kiel senfina rubando (en la rekta senco de tiuj-ĉi vortoj) iradis kaj veturadis piedirantoj, rajdantoj kaj kaleŝoj; super la monto, kiu kaŝis de l' okuloj Bibi-Ejbat'on, pendis nigra nubego de fumo, lumigita sur ĝiaj randoj; iafoje, kiam la vento facile ĝin dismetadis, la domoj kaj la preĝejo de l' antaŭurbo Bailov eklumiĝadis, kiel per bengala fajro ĉe ia teatra efekto. — Fine oni transiras la supron de l' apuda monto kaj oni malleviĝas Bibi-Ejbat'on. Maldekstre la maro kolere pelas ĝiajn ondojn bordon; antaŭe — oni vidas amason da borturoj kaj fumtuboj nur facile lumigataj sur la supraj randoj per purpura brilo de l' flamo, kaj en sekvo de tio ĉi ili montriĝas ankoraŭ pli nigraj; dekstre kaj ankoraŭ pli antaŭe — la krutaj montoj, ĉirkaŭantaj Bibi-Ejbat'on, — nudaj, senagrablaj, — sen ia signo de arboj, kiel ĉiuj ĉirkaŭaĵoj de Baku; kaj en la centro mem de tiu ĉi pentraĵo, sed pli proksime al la posta plano, — grandega kolono de flamo, kiu tamen estas vidata neklare, ĉar la vento pelas la fumon rekte al la rigardanto; ju pli proksime oni aliras laŭlonge la vojo, sorbiĝita per grasa nafto, kaj elkurbiĝanta inter borturoj, domoj por laboristoj, fumtuboj kaj naftotuboj, — ju oni aliras pli proksime, des la pentraĵo en tuta ĝia grandegeco vidiĝas pli klare: fine, oni aliras tien, kie amasiĝis la plej granda parto da kaleŝoj kaj rigardantoj; super la tero nubege buliĝas fumo kaj vaporo; el tiu ĉi nubego, facile alkliniĝante al ni, leviĝas flama kolono, ĉirkaŭita de fumeto, kiu iom post iom per grandegaj buloj bruliĝas kaj aliformiĝas je nigra densa fumo; ĉirkaŭe — ĉio, kio nur povis bruli — estas jam bruligita: borturoj, naftaj lagoj, konstruaĵoj; la flamo nun ie kaj tie trakuras super la tero, sorbiĝita per nafto; laboristoj dismetas la proksimajn borturojn (ĉetere, la interspaco estas sufiĉe granda); oni ne povas longe resti tie: tiela granda estas la varmego, kiun la vento blovas rekte rigardanton. Sed jen — mi ĉirkaŭiras la akirlokon laŭlonge la vojo ree apenaŭ ĝis la maro mem, sed tiel, ke nun mi staras ne vizaĝe, sed al la vento' — kaj la brulego estas vidata en tuta ĝia grandegeco. El la tero staras ankoraŭ en la flamo la fino de l' bortubo, kaj super ĝi — facile larĝiĝante supren, leviĝas tute rekte flama kolono ne malpli ol 55—60 metroj altece; en la mezo de tiu ĉi movema flama kolono ankoraŭ ĝis  $\frac{3}{4}$  de ĝia alteco estas vidata, kiel daŭrigo de l' bortubo, nigra strio, sur kiu kiel serpentetoj trakuras fajretoj; tio ĉi estas la elĵetata nafto, kiu ankoraŭ ne ekbruliĝis. La bruego, kiu estas aŭdata jam en la vojo Bibi-Ejbat'on, malgraŭ la vento kaj albatado de l' ondoj, — tie fortiĝas tiel, ke oni ne povas aŭdi la demandon, kiun turnas unu rigardanto al la alia. La leganto certe aŭdis la bruon de vaporo, ellasata el kaldrono; li volu nun imagi, ke vaporo estas ellasata per unu fojo el cent kaldronoj, kaj li havos nur malfortan komprenon de tiu ĉi terura bruego de l' brulanta fontano.

La tuta proksima ĉirkaŭaĵo estas hele lumigata, tio ĉi estas ne taga lumigaĵo — blanka kaj egalmezura; la lumo nun estas ruĝeta, kaj — ĉar ĝi

ne estas distrita, sed eliras el unu linio — ĉio, kio estas turnita al la brulanta fontano, estas lumigita en ĉiuj ĝiaj detaloj, des pli ke la ombroj kuŝiĝas akre, sen nuancoj kaj interkoloraĵoj. En sekvo de kontrasto kun tiu ĉi grandega flama kolono la leviĝanta luno ŝajnas esti de malhita-verda koloro, kaj la konsumita, malluma, superpolvita herbo apud la fundamento de montoj — nuancas je blueco. La montoj ĉirkaŭantaj la krateron, estas lumigataj kiel dum tagiĝo; la ĉielo en sekvo de kontrasto montriĝas nigra, kaj la okulo eĉ ne distingas sur ĝi la stelojn. Sur la maro subite lumigadas kaj malaperadas en la nigra akvoprofundaĵo la suproj de ondoj, kaj la ŝipoj kuŝantaj sur ankroj akre eliĝas sur la nigra fono per iliaj lumigitaj mastoj. — Oni ree kaj ree turnas la okulojn al la flama bruleganta kolonego, kiu leviĝinte tiel alte, en sekvo de premo de l' vento, facile elfleksiĝas kaj aliformiĝas je fumo per grandegaj, purpuraj buloj. Tio ĉi estas tiela sceno, kiun oni ne povas baldaŭ forlasi kaj kiun, certe, oni ne forgesos baldaŭ.

Starante apud ia muro por defendiĝo de l' vento, rekte kontraŭ la bruleganta, blindiganta la okulojn, grandega, fluetanta flama kolono, mi subite ekvidis apude ankoraŭ alian rigardanton, — grandan blankan ŝafhundon. Alpremiĝinta al la muro, senmova, ĝi rigardis la flaman fontanon. Kio fariĝis en tiu parto de ĝia esenco, kiu konformas je nia animo? kiaj sentoj, kiaj pensoj, — se estos permesita uzi tiujn ĉi esprimojn, — ekscitadis la beston? Tiun ĉi demandon ne povos respondi nek mi, nek vi, mia leganto, ĝis tiu tempo, kiam estos divenita tiu unua leĝo, kiu egale fundamentigas la brulegon de nafta fontano kaj la sekvigatan per ĝi impreson je l' senvorta besto.

Por finigi la brulegon oni ekfosadis subteran kavon, per kiu oni volis elfluigi nafton el la tubo, en kiu estus sub la tero farota malfermo; tiun ĉi laboron oni esperis fini nur en ĉirkaŭ 20 tagoj. Sed post kelkaj tagoj la forto de l' fontano ekmalgrandiĝadis; en dimanĉo, la  $13/25$  Aprilo ĝi eĉ kelkfoje haltiĝis, — kredeble, en la bortubo ekfariĝadis "korĉo", — kaj ree ekelverŝiĝadis; sed la brulo estis jam tiel malfortigita, ke multe da nafto, kiu jam ne povis tute forbruli kaj estis dispolvata per vento, superŝprucadis la domojn en antaŭurbo Bailov; kaj fine, en lundo, la  $14/26$  Aprilo, en ĉirkaŭe 3 horoj post tagmezo, la brulego kaj la fontano tute finiĝis.

Laŭ la tiama prezo de nafto kaj laŭ la forto de fontano oni supozas, ke ĉiuj dudekkvar horoj forbruladis senprodukte nafto kore de kvazaŭ kvindek miloj da rubloj.

Baku. Rusujo.

M. M. Abesgus.

## Pri skribado de propraj nomoj.

En sia artikolo pri skribado de propraj nomoj s-ro Krikortz (kredeble Krikorc?) nomis "pilkjeton" la plej logikan defendadon de s-ro Borovko. Mi estis tre mirita per tio-ĉi, kaj kvankam mi preskaŭ ne havas en nuna tempo liberan horon, tamen mi decidis nepre respondi, ĉar multaj legantoj de "L. I." povas opinii ke efektive s-ro obstinulo kaj sola kontraŭulo de nacia skribado de propraj nomoj... Niaj amikoj devas ĉiam memori ke:

1) Skribado de propraj nomoj en patrolingvo estas neebla por plej multo da esperantistoj laŭ simpla kaŭzo: a) se ili volus presi iliajn nomojn per iliaj naciaj literoj — nenia alilanda esperantisto tralegos ilian nomon; b) kaj en esperanta presejo oni ne trovos necesajn literojn.

2) S-ro Krikortz forgesas (tiel kiel ankaŭ estimataj francaj esperantistoj *Bofron*, *Lemer* kaj *Mok*) ke ĉiuj rusaj, hinaj, bulgaraj kaj aliaj esperantistoj por granda celo de unu internacia lingvo devas senigi siajn nomojn preskaŭ de ĉiuj literoj de ilia patrolingvo (t. e. rifuziĝas, laŭ esprimo de s-ro Krikortz, ilian "posedrajton"), sed jen kiam ili ofertas preskaŭ ĉion, la francaj kaj anglaj esperantistoj faras grandan bataladon nur pro unu aŭ du literoj.

Rimarko: el mia nomo mi konservas en esperanto nur du literoj: *o* kaj *k*, tiel ankaŭ s-ro Borovko, tiel ankaŭ (se eĉ ne pli) ceteraj rusaj esperantistoj.

3) Ĉu nia eminenta verkisto Lev Tolstoj perdis sian "posedrajton" kaj famon, se lian nomon en Francujo, Germanujo oni ne skribas tiel kiel li mem skribas (tio estas: ne per rusaj literoj)?

4) La angla verkisto "Ŝekspir" en Rusujo estas tre konata danke al liaj verkoj, kaj lia famo neniel malpligrandiĝis pro tio, ke lian nomon oni ĉian skribas en Rusujo per rusaj literoj (fonetike) kaj ke apenaŭ  $\frac{1}{1000}$  da liaj rusaj legantoj scias anglan skribadon de lia nomo, kaj ke apenaŭ  $\frac{1}{100}$  el ili povus vere tralegi lian angle skribitan nomon. (Kontraŭe mi ne unufoje konvinkiĝis, ke nomon skribitan ne en lingvo de legantuloj oni baldaŭ forgesas).

5) Kiel oni povas skribi la nomon de fama hina politikisto Li-Hung-Ĉang ne "ŝtelante" (esprimo de s-ro Kr.) lian "posedaĵon".

Ne! Se ni estu justaj, ni konvinkiĝu, ke ĉiuj devas fari necesajn oferaĵojn por atingi komunan grandan celon. Oni povas eĉ rimarki, ke la plej malgrandajn oferaĵojn sendube devos fari popoloj, uzantaj radikojn kaj literojn latinajn. Sekve estas tre strange kaj domaĝe, ke inter tiuj, kiuj ricevis la plej multe, troviĝos pli multe da nekontentaj.

Kaj tial laŭ mia opinio ĉiu devas skribi sian nomon tiel, ke esperantistoj de kia-ajn nacio povus ĝin tralegi kaj eldiri, ĉar internacia lingvo decas esti uzebla por skribado kaj parolado. Se do iu volas konatigi alilandulojn kun nacia skribado de lia nomo, li povas ĝin starigi inter krampoj.

*S. Peterburgo, 31. III. 1898.*

**F. Postnikov.**

## Voĉo en la nokto.

### Rakonto de ŝipestro.

En unua semajno de Majo mi forlasis Mersey per vaporŝipo de veturantoj plenigita kaj iranta al Ameriko. Post la daŭro de kvin tagoj venis al mi la vico unu nokton je la dua horo akcepti la gardon sur la ponto de komando. Alveninte supren, mi diris al mia antaŭulo, la dua direktilestro, kiun mi anstataŭis: "Estas strange malvarma tiu ĉi nokto." — "Tio ĉi nur ŝajnas al Vi, ĉar Vi elvenis el Via varma kajuto", respondis li, post kio li deziris al mi agrablan gardon kaj iris malsupren. Mi restis sola supre.

La nokto estis peĉmalluma; ŝajnis, ke la ŝipo estas envolvigita en dikan, nigran vualon. La maro estis kvietaj kaj ĉia vento ŝajne malaperis. La sola sono, interrompanta la profundan silenton, estis la surda, regula ĝemado de l' vapormaŝino.

Ĉirkaŭrigardante, mi nur kun la plej granda peno povis malkovri la du homojn, kiuj gardis sur la ferdeko kaj en la elrigardista korbo. Ambaŭ tamen estis sur sia posteno, kaj mi komencis kiel ordinare iri malrapide antaŭen kaj returnen sur la ponto. Tiam al mi venis la penso, kia nuksĉelo sur la grandega oceano nia granda ŝipo estas kaj ke nur maldika fera folio sin

trovas inter la centoj da homoj, kiuj dormas sub la ferdeko, senhelpeblaj en okazo de danĝero kaj nekonsciantaj, kaj la timinda amastombo malsupre en la nemezurebla profundaĵo kun ĝiaj teruraj monstroj, kiuj povus festeni je ili, se tiu ĉi maldika ŝirmo rompiĝus.

Kaj tiel alŝteliĝis al mi ia stranga teruriganta sento, kiun mi ne povis klarigi, kiu tamen tremigis min en la tuta korpo. Ia timo al mi nekomprenebla je io nekonita, terura traflugis min el kapo ĝis piedoj; vane mi penis venki ĝin. Mi eksentis kvazaŭ ion nepreneblan sed superpotencan; ke mi devos ion fari, sed kion — mi ne sciis.

Tiam mi ekaŭdis voĉon, kiu klare diris en mia orelo: "Haltigu la ŝipon!"

Mi zorge ĉirkaŭrigardis ĉirkaŭ mi je ĉiuj flankoj: mi estis sola sur la komanda ponto. Mi elapogis min ekster la balustrado kaj rigardis malsupren sur la ferdeko; ĝi estis dezerta. Ĉio kuŝis mallaŭte kaj trankvile.

"Ĉio bone, ŝipnaze kaj poste!" ekkriis Thompson, la boatulo, kiam lia alta formo antaŭŝoviĝis el la malsupra mallumo.

"Kian ordonon donis la kapitano, antaŭ ol Vi tien ĉi alvenis?" mi demandis.

Mi tre bone sciis, ke la voĉo de mi aŭdita ne estas la voĉo de l' kapitano, sed mi deziris sciigi, ĉu Thompson ion aŭdis.

"Kapitano? Ordonon?" ekdemandis li tute mirigita. "Li estas en sia kajuto."

"Ĉu Vi ne aŭdis diri iun: Haltigu la ŝipon", mi rediris.

"Ne, direktilestro; mi povas ĵuri je tio ĉi."

"Bone, Thompson, sed ekrigardu bone, ke nenio okazu en tiu ĉi mallumo." — "All right, direktilestro."

Li foriris kaj mi sentis emon rideti je mi mem, kiam ree tia agoniganta sento ekleviĝas ĉe mi kaj avertanta voĉo eksonas en mia orelo: "Haltigu la ŝipon! Haltigu!"

Vane estis kontraŭbatali, ia nevenkebla potenco aligis min al la telegrafo, kondukanta malsupren en la maŝinan ĉambron. Ĉirkaŭprenante la tenilon, mi restadis ankoraŭ unu momenton, vive vidante antaŭ mi la estontan malordon kaj la koleron de l' kapitano maldormiĝinta kaj trovinta, ke mi kuraĝas fari tian ion sen lia ordono. Sed en la sekvanta momento mi tute trankvile komandis: "Malrapide!"

Mi sentis, kiel la batoj de l' maŝino malpliĝas, kaj mi tamen pli kaj pli klare aŭdadis kiel en freneza preĝo: "Haltigu! Haltigu la ŝipon!" Sen malfruadi plu mi telegrafis: "Haltu!"

Baldaŭ la krio en mia orelo ĉesis. Mi aŭdadis mirigitajn ekkriojn de la gardstarantoj: sur la ferdeko oni komencis moviĝi kaj la kapitano elĵetiĝis en teruriganta rapideco sur la ponto de komando.

Sed antaŭ ol li atingis min, la neklarigebla potenco prenis min kaj mi signalis al la maŝina ĉambro: "Plene malantaŭen!"

"Pro Dio, Brown, kio estas tio ĉi?" mi aŭdis ke ekkrias la mirigita kapitano, kiam la forta ŝraŭbego ekkomencis sian malantaŭigantan movadon kaj devigis la grandan ŝipon haltigi sian iradon.


Sed antaŭ ol mi havis tempon respondi aŭ deĵeti unu rigardon post mi, eksonis forte la voĉo de la elrigardisto: "Unu monto de glacio tute apud ni."

Tuj poste malforta puŝo sekvis kaj ia tremo trakuris la ŝipon, kiam ĝi kun la nazo malpeze alpuŝis kontraŭ la danĝera malhelpaĵo.

Kia fariĝus nia sorto, se ni plenirade estus alkurintaj al la glacia monto, tio ĉi estas facile imagi al si. Veturantoj kaj maristoj devigis akompani ĝis la fundo nian noblan ŝipon.



Neniam antaŭe en mia vivo mi turnis mian atenton al la tiel nomataj antaŭsentoj, sed mi nun kredas je ili. Kaj mi nun ankaŭ komprenis, el kio venis la stranga malvarmo. El sveda tradukis d-ro I. Asklöf.



## La elektreco aera kaj la seksvivo de l' virino.

Pri la ligo inter tiuj, ŝajne disaj, faktoj la eminenta sveda fizikisto, profesoro Arrhenius, antaŭe konata per sia elektrolita dissociacia teorio, ĵus havis interesajn paroladojn en medicinaj kaj fizikaj sciencaj societoj de Stokholm.

Ke la elektreco aera povas influi la organismon, oni jam longtempe supozis, kaj la glora nevrologiisto Charcot ankaŭ penis montri tiun influon.

Nun la profesoro Arrhenius kune kun la meteorologiisto d-ro Ekholm ĵus finis esploradojn, kiuj ŝajnas pravi decidan rilaton inter la periodoj de l' elektreco aera kaj la lumo polusa unuflanke kaj la menstruacio aliflanke. La elektreco aera havas du periodojn, unu havante la longecon da 27,322 tagoj, la dua da 25,329 tagoj. Unua periodo, ankaŭ nomita la tropik-monata, dependas de la situacio de la luno rilate la ekvatoro; la kaŭzoj de l' alia ankoraŭ estas nekonataj. Kiam la luno estas norda rilate la ekvatoro, tiam la elektreco aera estas malforta sur la norda duonglobo kaj forta sur la suda; kaj turne kiam la luno estas suda. Dum la influo de l' unua periodo alternante mal-egalas sur ambaŭ duongloboj, la influo de l' alia samtempe estas egala sur tiuj-ĉi, kaj estas plej forta ĉe la ekvatoro, l' alia havante sian plej fortan influon en la polusaj regionoj. Krom tio estas kelkaj aliaj diferencoj.

La unua vivapero kiun profesoro Arrhenius penis ligigi kun tiuj periodoj, estis naskeco. Ampleksa, statistika materialo montris decidan kaj regulan periodan ŝanĝon, kiu estas paralela je la periodoj de l' elektreco aera.

Ankoraŭ pli ligita rilato tamen troviĝis inter la menstruacio kaj la periodoj de l' elektreco aera. Prilaboro matematika de la statistika materialo, kiu estis ricevita el la naskejoj de Stokholm, kondukis al tio, ke oni povas meti 16,000,000 kontraŭ 1, ke la ligo ne dependas je okazo. La plej granda nombro da menstruacioj montriĝis en ambaŭ periodoj ĉirkaŭ unu tago post la plejgrandeco de l' elektreco aera, kio ŝajnas montri, ke tiu-ĉi fenomeno favoras l' aperon de tiu.

Statistiko de 1,844 okazoj, farita de la dana kuracisto Hannover, montris mezlongecon de la periodo menstruacia da 26,68 tagoj.

La meznombro de l' ambaŭ periodoj de l' elektreco aera estas 26,63 tagoj; tial la diferenco ne estas pli granda ol  $\frac{1}{20}$  tago.

Tiu-ĉi rimarkebla rilato montras ligon plej proksiman inter la elektreco aera kaj almenaŭ unu ĝis nun malfacile komprenigita el la funkcioj de la korpo homa.

S. E. Krikortz.



## Jakob-Pesimisto.

De L. Perc.

El hebra-germana tradukis B. Spektor.

Mia Jaĉjo, unu foje sidante en la preĝejo, kie estas ankaŭ la lernejo de hebraj-junuloj kaj lernante la libron "Ĥojvas-halvuvojs" (\*), ekkoleris subite

